sularo. Ĝi havas diametron de tri mejloj kaj duono, kaj perimetron de dek sep mejloj. Ĉe la fundo estas lago el malvarma lafo, kiu antaŭe estis ruĝe varmega, bolanta maso. La kratero mem estas granda abismo, ĉe la flanko, tricent futojn sub la planko de la vulkano. Tiu lago el bolanta, ŝprucanta fandita lafo estas mirinda vidaĵo. Oni povas sidi ĉe la rando de la kratero, kun la kruroj pendantaj trans la rando, kaj rigardi la profundajn malsupre tricent futojn. En la nokto la vidaĵo estas ankoraŭ pli interesa. Ĉiam grandegaj nebuloj da fumo kaj vaporo supren iras el la abismo, dum la ondoj da fajro turniĝas kaj moviĝas malsupre.

G. C. GEARN.

of islands. It has a diameter of three and a half miles, and a circumference of seventeen miles. At the bottom there is a lake of cold lava, which one time was a red-hot, boiling mass. The crater itself is a large abyss, at the side, three hundred feet beneath the floor of the volcano. That lake of boiling, spouting melted lava is a marvelous sight. One can sit at the edge of the crater, with his legs hanging over the edge, and look at the bottom three hundred feet below. In the night the sight is still more interesting. Enormous clouds of smoke and steam are always coming upward out of the abyss, while the waves of fire turn and move below.

LA "SUFRAGETA" MOVADO EN ĤINUJO

Miaj karaj usonaj samideanoj eble kun intereso scios la movadon de la "sufrageto" en Ĥinujo, kaj iuj sinjorinoj entuziasme legos tiun ĉi artikolon. Kompreneble tia movado nur ekzistas en Kwanton en Ĥinujo, kiu estas la naskiĝejo de revoluciaj movadoj en la daŭro de hina historio. Ĉar Kwanton estas tia loko, la gradoj de civilizacio kaj la stato de kutimoj estas rimarkinde pli bonaj ol en aliaj provincoj. Precipe post la lasta revolucio la ĝeneralaj ideoj ŝanĝis tre surprize; sed pro tio oni avide postulis novajon en ĉiuj aferoj.

Tial la sufrageta movado estas pli granda ol nia supozo, kaj ĉe provinca kunsido oni sendis kelkajn virinajn komitatanojn. Je tiu ĉi tempo aperis kvar virinoj, kiuj insistis pri la egala rajto de viro kaj virino, aŭ postulas politikan rajton por virino, en ĉiutagaj jurnalaj kaj oratoradaj. Iuj el la virinoj eĉ volas montri per si mem ke nenia diferenco ekzistas inter viro kaj virino,

okupiĝante en politika rondo, detranĉinte siajn harojn kiel viro. Tiamaniere, kiam fondiĝis Virina Politika kaj Leĝa Lernejo, tre multaj virinoj fariĝis lernantinoj, kaj entuziasme diskutis pri politiko kaj leĝoj. Kelkaj eĉ insistis ke virino havas ankaŭ la devon soldatiĝi, por meti virojn kaj virinojn en egala pozicio. Tre rimarkinda afero ilia estas la bojkoto kiun ili elpensis. Kiam la demandoj de la voĉdonrajto estis diskutataj en Pekin kaj Kwanton, virinoj apartenantaj al ĉi tiu movado malfermis konferencon kaj decidis ke edzinoj bojkotos kontraŭ la edzoj, kaj fraŭlinoj ne edziniĝos ĝis post dek jaroj. Ili deklaris ke per tia metodo ili altiros atenton de la viroj, por plenumi la insiston. Sed je la vira flanko oni diras, ke oni ekzameni ĉu viro aŭ virino estas pli pacienca. Miaj altestimataj hinaĵ sinjorinoj, kiam vi rompos fenestrojn kiel britaj sinjorinoj?

МОТОНИКО,
Tokio, Japanujo.

La Portreto

En mia kor' jen la portreto via,
Kiun nenio povas igi for;
Pentrita estas ĝi de mano Dia
En mia kor'.

Ĝi estas bela kiel migdalflor'
De la printempo,—la vizaĝo via;

Ĝi min ĝojigas. For de l' vivo mia
Ĝi pelas ĉiam senton de dolor';
Sendube estas ĝi la beno Dia
En mia kor'.

JOHN BISHOP.

La Verda Standardo

(A Propaganda Play in One Act.)

BY JOSEPH H. NOBLE

PLACE: On the deck of the "Finland," in the middle of the Atlantic Ocean.

TIME: August 9, 1913.

PERSONS: Captain Lee, of the Finland.
William Bell, an Esperantist.

Dr. Victor DeVito, Surgeon of the cruiser "Pluto" of the Italian Navy.

First Mate Adams, of the Finland.

John Schmidt, German Passenger.

Miss Green, Sea-sick Passenger.

(Enter Captain Lee.)

CAPT. LEE: It's lucky we sighted that Italian cruiser. Here we are in the middle of the Atlantic, with our ship's doctor lying sick in his cabin, and not a physician among the passengers!

(Enter William Bell.)

They are sending us the Surgeon of the Italian cruiser. I hope it isn't a contagious disease. That would tie us up at quarantine.

BELL: I share your hope, Captain, for I must be in Berne, Switzerland, on the 24th for the opening of the Ninth International Congress of Esperantists.

CAPT. LEE: Yes, I know. You were telling me about the Esperanto Congress, but I think I can beat your Esperanto. See that Italian cruiser over there? Although I don't understand the Italian Language and the cruiser's Captain does not understand English, we have been talking to one another by means of those flags and the International Code. At a distance of ten miles I asked him to send a Doctor, and you see there he comes in the boat!

BELL: That proves that it is a great convenience to be able to speak to foreigners. The flags may be all right here on the ocean, but we land-lubbers can't carry a trunk full of flags and a code book with us wherever we go. Wouldn't I look nice, standing on a street corner in Paris with an armful of flags, trying to

ask a cop the way to the base-ball grounds?

(Enter Dr. DeVito and Mate Adams.)

CAPT. LEE: Here he comes. I'm glad you came, Doctor! Our doctor is a very sick man and we don't know what is the matter with him or what to do for him.

MATE ADAMS: He doesn't understand English, sir.

CAPT. LEE: Oh, of course not. (To Mate) Show him to the Doctor's cabin. (Exit Dr. DeVito and Mate Adams.)

BELL: Why didn't you try your flags on him? The flags are all right ten miles away, but when you are near a foreigner you need Esperanto! Had you and our friend the Italian each spent a few weeks in studying the International Language, you would now be able to converse with one another. But suppose he had spent five years in studying English. He would now be able to speak only broken English, like an Italian fruit vender. Suppose you had spent five years in studying Italian. Very likely you would have sighted a Spanish or a Russian ship instead of the Italian cruiser. You could not learn all the languages. Life is too short. The only way out of the difficulty is for all educated persons of all nations to learn, in addition to their own national language, one common international language. Let each use his native tongue when speaking to a fellow countryman, but let each be prepared to communicate with foreigners in a language understood by all.

CAPT. LEE: What's the matter with their all learning English?

BELL: Because they will not do it.

(Enter Schmidt.)

SCHMIDT: Gabden Lee, vy der sheep schtsobs? Iss id zumzings loose mid der enshens yet?

CAPT. LEE: No, we have stopped to

take aboard a doctor from the Italian cruiser.

BELL: You don't want to spend the summer in the middle of the Atlantic, do you, Mr. Schmidt?

SCHMIDT: I kiff you hright! Vere iss et der dago sheep? (*Bell points*) O, dere iss eet! (*goes out.*)

BELL: English as an international language, when they speak it like that, after living in America for five years? The Frenchman has a different way of mutilating the language, and the Spaniards still another way. Even the English speak it with an accent. I am afraid they would never understand one another. English is too difficult. Italian is the easiest national language to learn, but even if all nations were to agree to use Italian as an international language, only a few people would be willing to make the terrible sacrifice of time necessary to acquire the language.

CAPT. LEE: How about Latin? When our Italian friend has found out what is the matter with the sick man, he will write a prescription in Latin. The ship's apothecary will understand what is written in the prescription. In fact the prescription could be filled in any drug-store on earth. Latin is taught in all schools and colleges in all countries. Latin is a *real* language, not an invention.

BELL: Also you might add that Latin is a dead language,—so called, Mark Twain assured us, because only the dead have time to learn it! Have you ever studied Latin?

CAPT. LEE: Yes, I had about six years of it.

(*Enter Miss Green.*)

MISS GREEN: Oh, Captain, can't you get the Italian Doctor to give me something? I met him down stairs and told him how seasick I am and he couldn't understand a word I said!

CAPT. LEE: I am sorry, Madam, but he can't understand me, either.

MISS GREEN: Oh, I wish I had stayed at home. Why don't these foreigners learn English? If I ever get on dry land again . . . (*goes out.*)

BELL: You might try your Latin on the Italian Doctor.

CAPT. LEE: Oh, I haven't kept it up!

BELL: And if you had, you could not converse with him on modern subjects. There is no Latin word for railroad, because there were no railroads in ancient Rome. And so there are thousands of modern ideas which cannot be expressed in Latin. If you wanted to adapt Latin to modern use you would have to invent thousands of words. You might as well rewrite the whole vocabulary and make it easy for modern minds to remember! Then, too, there is the Latin grammar, requiring about a lifetime to master, while the Esperanto grammar is systematic, and consists of a few clear rules with no exceptions. Its elements can be learned in a few hours, from 16 general rules.

CAPT. LEE: Only 16 rules?

BELL: And *no* exceptions. Here is a little key to the language (*giving Esperanto Key to Captain*). It contains the complete grammatical system and a vocabulary of about 2,000 words, quite enough for ordinary conversation or correspondence. Of course a complete dictionary is a much larger volume. These keys are published in 20 different languages and cost but 2 cents each. I can write a letter in Esperanto and send it with a key, to a person who knows nothing of the language, and he will be able to read my letter!

CAPT. LEE: How long does it take to learn this language?

BELL: Count Leo Tolstoi said that he was able to read the language after two hours' study, but, of course, most of us don't learn so quickly. After I had studied for two weeks I began exchanging post cards with foreign Esperantists, though. Here are a few cards which I received from various countries—Russia, Chile, Switzerland, Turkey, Spain.

CAPT. LEE (*interrupting*): Read one of them. I want to hear how it sounds.

BELL: This one is from a young man in Italy, just graduated from a medical college. He writes (*reads*):

"Kara Amiko:—

"Bonvolu pardoni mian prokraston. Pro miaj ekzamenoj mi estis tre okupata. Mi esperas ĉeesti la Naŭan Kongreson de Esperanto, en Bern. Tie mi ĝoje renkontos vin.

"Kore via,

"VICTOR DEVITO."

(Enter Dr. DeVito.)

DR. DEVITO: Mia nomo! Mia poŝtkarto! Ho, vi estas mia amiko William Bell! Ĉu ne? (They shake hands warmly.)

BELL: Jes, kaj sendube vi estas mia itala amiko, Victor DeVito! Mi ĝojas vin vidi!

DR. DEVITO: Kiam mi skribis la karton mi intencis iri al Svisujo por ĉeesti la Kongreson, sed oni sendis min al la militŝipo. Tial, bedaŭrinde, mi ne povos ĉeesti la Kongreson; sed feliĉe mi vin renkontas ĉi tie.

MATE ADAMS (to Captain Lee): The Captain of the Pluto signals for the Doctor to return as soon as possible. They are anxious to get under way.

CAPT. LEE (to Bell): Will you tell the Doctor that they are anxious for him to return to the Pluto?

BELL: Mi bedaŭras, sed la kapitano de via ŝipo deziras ke vi reiru al la ŝipo.

DR. DEVITO: Mi devas foriri. Mi skribos al vi al ĉe Bern. Adiaŭ, mia

amiko. (They shake hands and DeVito goes out.)

BELL: Ĝis la revido! Mi atendas la leteron!

CAPT. LEE (who has been studying the key and reading a post card): Wonderful, perfectly wonderful! I can read this Russian's post card. Some of the words are so nearly like English words that I can guess their meaning without looking in the key. For example, "la verda standardo." "Standardo" means standard, doesn't it?

BELL: Yes, "standardo" means standard or flag. "La verda standardo" means the green flag. In English, verdant means green, you know.

CAPT. LEE: The green flag! What's the green flag?

BELL (taking a small green flag from his pocket): La verda standardo estas la standardo de Esperanto!

CAPT. LEE (translating slowly): The green flag is the flag of Esperanto! Well, you may enlist me under la verda standardo!

Curtain.

Sen Rifuĝejo

DE VERA FIGNER

(La aŭtorino, unu el la plej famekonataj rusaj revoluciulinaj, estis en 80aj jaroj de la XIXa jarcento ano de la tiel nomata "agada komitato" de la partio "Popola Volo." Inteligenta kaj ĉarma juna virino, ŝi estis en 1884 laŭ juĝa verdikto enŝlosita dum 20 jaroj en terura "ŝtona sako" de la malbonfama fortikajo Slisselburgo, el kie ŝi, malsana, kripligita fizike, sed en plena posedo de siaj spiritaj kaj moralaj fortoj, estis liberigita en 1904; kaj post nelongedaŭra ekzilo en Norda Rusujo ricevis plenan liberecon, kaj nun loĝas en Svisujo, kaj de tempo al tempo donacas al siaj sampatrujanoj siajn poesiplenajn prozajn memoraĵojn, kaj ankaŭ siajn altvalorajn poeziaĵojn, plejparte verkitaĵn de ŝi en Slisselburgo. Mi elektis por traduko ĉi tiun fragmenton el ŝiaj intimaj travivaĵoj, ĉar ĝi prezentas al ni la altgrade delikatajn sentojn de tiu "teruristino," kiu en sia terura malliberejo ne ĉesis suferi pro tio, ke iam ŝi pro partiaj konsideroj devis senaverte

elmeti al danĝero la simpatiajn, bonkorajn geedzojn, simplajn eksterpartiajn laboristojn.)

SUB miaj piedoj neĝa kraketas; el la ĉielo steleto al mi rigardas. . . . kaj ĉirkaŭe—mallumo, malvarmeĝo, senhomeco. . . . kaj mi rapide kuras ekster la urbon, al Manjo.

Manjo estas gaja ruĝvanga, bela dikulino kun nigraj haroj kaj grandaj brunaj okuloj. Ŝi estis riĉa kaj estos ankoraŭ pli riĉa, kiam ŝi edziniĝos kaj ricevos la doton. Bona, inteligenta fraŭlino, ŝi finis gimnazian kurson kaj intencas loĝi en sia bieno kaj sin okupi per propagandado.

Ni estas en plej bonaj interrilatoj kaj mi nun iras al ŝi por pasigi la nokton. Jam de du semajnoj mi ne havas loĝejon, kaj tie pasigas tagon, ĉi tie nokton. Jam laca mi min sentas, sed kion fari? La kamaradino Panjo bezonis pasporton, mi

donis al ŝi tiun, laŭ kiu mi lastatempe estis loĝanta, kaj mi estis sen pasporto, do,—sen rifuĝejo.

Mi iom timas esti sola en malluma vespero meze de dezerta kamparo. Neĝo kraketas. . . . Stelplena ĉielo rigardas, kaj ĉirkaŭe estas mallumo, malvarmeĝo, soleco.

Jen fine la domo . . . la pordo . . . la sonorileto. Estas agrable post la terura mallumo sidi en varme hejtita ĉambro, kie hele lumas lampo kaj kie sidas geamikoj.

“Bonan vesperon!”

“Bonan vesperon! Mi venas al vi por la tuta nokto. Sed kion vi faras? Ĉu vi intencas ŝanĝi loĝejon?”

En la ĉambro estas senorde disjetitaj diversaj aĵoj, sur la lito kuŝas virina vesto, sur la planko staras valizoj. Juna studento, fianĉo de Manjo, sur tapiŝo surgenuinte enpakas librojn kaj apude staras ŝi kun amaso da tolaĵo en la brakoj.

“Ne, sed morgaŭ mi tute forveturos.”

“Kien?”

“Odessa’n.”

“Bonege! Mi bezonas sendi tien leterojn, ĉu vi transdonos ilin?”

“Kompreneble.”

Mi sidigis al la tablo kaj komencis skribi leteron, kaj tute senintence mi vidis senparolan scenon. La junulo deŝiras folieton de papero, skribas kelkajn vortojn, kaj donas al Mario.

Si faras neantan aŭ malaproban geston. Poste ŝi ankaŭ prenas paperon kaj skribas . . . kaj la samo ripetigas du—trifoje.

Mi finis kaj ekstaris.

Io malbona okazis: la vangoj de Mario estas purpurruĝaj, ŝiaj okuloj pleraĵ je konfuzo.

“Aŭskultu, mia karulino,” ŝi balbutis, “Estas neeble pasigi nokton ĉe mi! Povas veni polico, fari traserĉon. Se oni trovas vin . . . miaj planoj . . . niaj planoj . . . pereos. . .

“Mi foriros. Adiaŭ.”

“Kial vi tiel rapidas?”

“Ne! Jam estas tempo, duono de la dek-unua.”

Kaj ŝi eĉ ne demandis, kien mi iros. Ĉu mi havas esperon ie ajn trovi rifuĝejon? Kaj efektive, mi nun ne scias kien iri.

Neĝo kraketas. . . . Mi preskaŭ kuras. Min doloras la penso, ke oni ne

hontas. Kaj ĉiu paŝo sur kraketanta neĝo sentigas en la gorgo, kvazaŭ skrapas ĝin io.

Kaj ĉirkaŭe mallumo, senhoma dezerto. . . . Nur en la ĉielo brulas steloj. . . . Tamen, kien mi iros? Se mi estus viro, la tutan nokton mi estus sidanta en publika ĝardeno, rigardante la stelojn.

Eble mi iru al Nikolao Antonoviĉ? Gastama familio. Malriĉaj simpluloj, per propra laboro perlaborantaj la panon. Li estas tornisto, havas propran metiejon. Kial la geedzoj estas tiel gastamaj? Mi ne apartenas al ilia amikaro aŭ kamaradaro. Eble pro tio, ke miaj vizitoj aldonas fajron da socia intereso, iun brilon da inteligenteco al ilia senkolora ĉiutaga vivo? Eble pro tio ili amas min kaj kun ĝojo akceptas?

Urbaj stratoj . . . publika ĝardeno . . . jen malnova domo, tie loĝas la simplanimaj geedzoj.

Mi frapetas ĉe la pordo. Estas bone, se ili ankoraŭ ne dormas.

“Kiu venis?”

“Mi!”

“Ha, estas vi, Sinjorino! Bonan vesperon! Bonvenon! Kial tiel malfrue?”

“Pli frue mi ne povis.”

“Negrave! Sed jam estas tempo por iri dormi: estas jam post la dek-unua. Morgaŭ ni devas frue ellitiĝi.”

Oni sternas freŝajn litotukojn sur malnovan sofion, oni alportas ies kusenon, kaj la gastamaj geedzoj retiriĝas en sian dormoĉambro.

Malgranda ĉambreto malriĉa, ne komforta. Kaj mi kuŝas sur fremda sofo, rigardas al la mallumo kaj kun peno kaŝas korŝirantajn sentojn. . . . Jen mi venis; venis al ĉi tiuj simplanimaj, bonaj homoj. . . . kaj ili donis al mi rifuĝejon. Kio mi estas por ili? Ili ne scias kiu mi estas, ili ne konas mian pasinton nek mian estonton. Ili ne scias ke polico min ĉie serĉas kaj avide min kaptus! Kaj al ili ankaŭ povas veni polico. . . . Manjo ĵus diris ke en ŝian loĝejon polico povas veni! Se polico venos hodiaŭ ĉi tien kaj trovos min . . . ili pereos! Pro kio? Mi ne konigis al ili miajn partiajn planojn . . . Certe, ili simpatias . . . ili scias ke mi estas revoluciulino . . . ili aŭdis miajn parolojn,—kaj tio estas ĉio.

Ilia vivo kuŝas antaŭ mi kvazaŭ sur

manplato, la mia estas kaŝita sub pseŭdonimo . . . kaj mi ne rajtas esti sincera rilate al ili. Jen mi riskas hodiaŭ, ne demandinte antaŭe pri ilia konsento. Kaj ili pereos! "Li" iros en malliberejon, "ŝi" kaj la infanoj estos sen pano. . . . Poste, ekzilo kaj plena ruinigo de ilia familia kaj laborista vivo.

Ho, malbenon! Ricevi amon kaj alporti pereon!

* * * * *

En la malliberejo mi kuŝas sur lito same kiel *tiam ĉi ili*. Mi rigardas al la mallumo kaj pensas. . . . Kie nun estas ĉi tiuj simplanimaj geedzoj? Kia estis ilia sorto? Mi poste estis arestita, kaptita, kondamnita kaj enŝlosita . . . kaj kaj nenia sciigo pri iu ajn . . . kaj pri ili same . . . kvin jarojn . . . dek jarojn . . . dek kvin jarojn . . . kaj ankoraŭ, ankoraŭ.

Mi kuŝas sur lito kiel tiam ĉe ili, kaj pensas. Se oni min liberigos, mi nepre kaj tuj skribos al ili . . . mi petos

pardonon, mi dankos pro la pasinto . . . kaj mi sendos iun malgrandan memoraĵon . . . skatoleton kun malgranda donaco por ĉiu el ili aparte.

Iliaj infanoj jam certe estas grandaj. Ili mem iĝis maljunaj. Versajne jam nepojn ili havas. Mi ne forgesu aldoni ludilojn . . . amuzajn infanajn ludilojn.

* * * * *

Mi eliris el la malliberejo. Mi serĉis ilin, mi demandis pri ili. Neniuj postsignoj. Iuj diras ke ili estas forveturitaj, aliaj certigas ke ili mortis. . . . Ne troviĝis la gemaljunuloj nek iliaj infanoj. . . .

Kaj la donacoj ne estas senditaj! Sed en mia animo kvazaŭ en la ĉielo estas multe da steloj: ĉiu bona konateco lumigis novan stelon kaj ekzistas ankaŭ steleto, de ili lumigita . . . ĝi brulas kaj parolas pri ili.

El la rusa tradukis

M. SIDLOVSKAJA.
Moskro, Rusujo.

ASKETO KAJ MUSO

En la *Gaŭtama* sovaĝejo estas asketo, kies nomo estas Mahatapa. Tiu iam en sia ermitejo ekvidis muson, kiu estis falinta el la beko de korniko. Do la kompatema asketo nutris ĝin per grajnoj da sovaĝa rizo. Foje vidis la asketo, ke kato alkuris por manĝi la muson, kaj li per sia mirakla forto faris katon el la muso.

Sed la kato poste timis iun hundon, kaj tiam ĝi estis ŝanĝita en hundon. La hundo tamen havis grandan timon al tigro, kaj tuj poste ĝi aliformiĝis en tigron. La ermito, tamen, ankoraŭ konsideris tiun tigron kiel muson. Ĉiuj tieaj homoj ankaŭ diradis, kiam ili rigardis la

tigron, "Jen la muso, kiun la ermito faris tigro!"

La tigro, aŭdinte tion, malĝoje ekpensis, "Tiom da tempo, kiom la asketo vivos, mi ne seniĝos de mia vera karaktero malfamiga!" Kaj tuj post tia meditado ĝi pretiĝis mortigi la ermiton.

Sed li, eksciinte ĝian intencon, diris, "Denove fariĝu muso!" kaj jen, ĝi ree tia ekestis!

Mi do diras: Malaltrungulo, kiu akiris honoran postenon, inklinas ataki sian sinjoron, same kiel la tigriginta muso intencis mortigi la ermiton.

El la sanskrita tradukis

F. REIME.

Statement of Ownership, Etc.

Of AMERIKA ESPERANTISTO, published monthly at Washington, D. C., required by the Act of August 24, 1912.

Editor, Ivy Kellerman-Reed, A. M., Ph. D., Washington, D. C.

Managing Editor, same.

Business Manager, same.

Publisher, The American Esperantist Company, Inc., Washington, D. C.

Owners: (If a corporation, give names and addresses of stockholders holding 1 per cent or more of total amount of stock).

Boston Esperanto Society, Boston, Mass.
Flora M. Wyman, North Abington, Mass.

Ivy Kellerman-Reed, Washington, D. C.

John M. Clifford, Jr., Braddock, Pa.

William L. Church, Boston, Mass.

H. S. Hall, Cleveland, Ohio.

H. B. Besemer, Ithaca, N. Y.

Known bondholders, mortgages, and other security holders, holding 1 per cent or more of total amount of bonds, mortgages, or other securities: None.

(Signed) IVY KELLERMAN-REED.

DISTRICT OF COLUMBIA, ss

Sworn to and subscribed before me this 3d day of April, 1913.

[SEAL]

LULA M. DRENNAN,
Notary Public, D. C.

(My commission expires July 14, 1913.)

Have You Yet Secured Your

Millidge Esperanto-English Dictionary?

An invaluable book (496 pages) printed on strong thin paper with wide margins, and durably bound.

You can not get along without it.

PRICE \$2.00

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

WASHINGTON, D. C.

NOTE—By agreement between the American Esperantist Company and the publishers in England, we are the exclusive publishers of this dictionary in America. Any edition not carrying our imprint on cover and title-page, published and sold in this country, is either not the genuine work of Millidge, or is a pirated edition.

Are you studying Esperanto?

Do you want help?

Would you like to have your exercises corrected regularly and all difficulties explained?

WRITE FOR CIRCULAR TO

**THE AMERICAN SCHOOL
OF ESPERANTO**

WASHINGTON, D. C.

A High-Class Correspondence School of Esperanto

LA REVUO

The best literary magazine
entirely in Esperanto :: ::

The only magazine which has the constant collaboration of Dr. L. L. ZAMENHOF,
the author of *Esperanto*

Yearly Subscription \$1.40

Single Copy, postpaid, 15 Cents

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

AGENTS FOR U. S. A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for \$1.00. We can not guarantee to send any special numbers at this rate.

FOREIGN MAGAZINES

Bundle of ten copies, our selection,
back numbers, for only sixty cents

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

WASHINGTON, D. C.

ESPERANTO STATIONERY

Fine quality paper with engraved green
star and word "Esperanto."

One quire, with envelopes to match,
65c. Sample sheet and envelope, 4c.

American Esperantist Company

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis *senpage*
romanon de A. Tolstoj „*Princo Serebrjaniĵ*“.
kies prezo por ne-abonintoj estas *Sm.* 1,60 *afr.*
Nun ĉiu abonanto de la j. 1913,—krom 12 n-roj
de l'gazeto—*senpage* ricevos *donace* post kelkaj
monatoj belan Esperantan libron:

„ORIENTA ALMANAKO“

*el la lingvoj japana, ĥina, araba, ĥinda, san-
skrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.*
„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton,
novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato
17x26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj
de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj.
Beletristiko originala kaj tradukita. Plena
kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun
premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda.
(Poŝt. ilustr.).

Sendu abonpagon (\$1.10) al la American
Esperantist Company, Washington, D. C.

You Ought to Take SCIENCA GAZETO

A monthly magazine entirely in Esperanto,
devoted to Science and Industry

Contains semi-technical articles on many inter-
esting subjects. Subscribe for your own pleasure
—and show each copy to some scientific friend

Send subscription (\$1.50) through American
Esperantist Company, Washington, D. C.

(Sample copy, 20 cents)

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 30c. (40 Sd.) por
ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1
Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume
42 literojn punktojn aŭ spacojn.]

S-ro P. T. Moskalev, Akm. Obl., Petropavlovsk.
Russia. Ĉiam respondos.

S-ro Vadim Buskov, studento-juristo, Nomer
„Volga,” Kazan, Russia.

S-ro J. Tepy, semb. ul. 124, vys, Myto, Bo-
hemia-Austria.

S-ro Julian E. Fast, Delphos, Ohio. Ĉiam re-
spondos.

S-ro Konstantin Pavloviĉ, str. Golutvino, Ejov,
Moskva, Russia, intersanĝos P. M., P. K.
insektojn, plantojn, papiliojn, kaj min-
eralojn por kolektoj.

S-ro Tadeo Libke, Sadovastr N. 30, Kovno,
Russia.

S-ro Hidajetula Khan, á la douane, Tabriz
(Tabriz), Persia.

S-ro A. M. Flesher, Box 542, Nowata, Okla

“Mi diris al li ke mi ne vidos lin plu!”
diris la bela fraŭlino al amikino.

“Li evidente kredas ke vi tion inten-
cas.”

“Eble, sed ĉu tio estas sufiĉa kialo por
ne alparoli al mi per telefono?”

Tradukis A. W. LANSING.